

Brazilei

járó 2 n-ro 5 2007



Valoro de Bildliteraturo en lernocambro



Paperfaldado

Paroligante
la lernantaron:
Prof. Paulo Nascentes





Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliĝinta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)

www.ilei.info



Brazila Sekcio de ILEI

Provizora Sekciestro: Joseo Tenorjo
Sekretariino: Conceição Rodrigues
Kasisto: Joel Afonso Francisco
Komitatano: Marcos Zlotovich

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso

www.ileibr.org
geinstruistoj@ileibr.org
biblioteko@ileibr.org
butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefono: (11) 6155-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: Joseo Tenorjo

kontakto: revuo@ileibr.org

grafikaranĝo: Joseo Tenorjo

provlegantoj: José Dias Pinto,
Eurico Ribeiro, Conceição Rodrigues
Jader Rodrigues kaj Edson Ponciano.

kunlaboris en tiu ĉi numero:

Prof. Sylla Chaves, Paulo Sérgio Viana,
Paulo Nascentes, Ulysses Baldez, Osmar
da Silva Alves, Conceição Rodrigues, Jader
Rodrigues da Silva, Fábio Henrique,
Luiz Alberto Oliveira, Adriano Prado.

SERĈATAJ

Se vi havas aliron al interreto,
povas virtuale deĵori, dum
kelkaj horoj monate, kaj
ŝatus kunlabori por la Sekcio,
bonvolu kontakti nin per
geinstruistoj@ileibr.org

Kiel artikole kontribui por Brazilie:

- Raporto pri instruagado en via regiono aŭ kursejo, se eble kun fotoj;
- Verkado aŭ traduko/adapto de mallonga instruamuzo teksto;
- Desegno aŭ traduko (kun permeso de la aŭtoro) de bildstrioj;
- Verkado de eseeto pri temoj koncernantaj instruadon;
- Recenzo de esperanta leg- aŭ lernolibro.
- Kompilado de tekstoj por la rubriko "Kurioza Mondo";
- Lecionospicimeno: ĉiu instruisto havas apartan manieron gvidi lecionon. Raporto pri kiel oni uzas sian instruilaron estas ege bona.
- Kian neforgeseblan lecionon vi jam gvidis? Uzu la rubrikon "Enklasaj Travivaĵoj" por kunĝui ĝin kun aliaj kursgvidantoj.
- Esperanta proverbaro estas riĉega esprimfonto ne multe uzata de esperantistoj. Eltrovi praktikan uzadon por tiu ĉi trezoro estas nia invito!
- Instruado de fremda lingvo por infanoj estas tute aparta mondo. Se vi iom spertas pri tiu fako, via artikolo estas sopire atendata!
- Se neniu el la ĉisupraj sugestoj plaĉas al vi, proponu mem vian temon.

Kontribuojn sendu rete al <revuo@ileibr.org> aŭ poŝte al la adreso de la Sekcio (vidu en la kolofono ĉi-apude).



Enhavo

Karaj Geinstruistoj
Ni lernu kaj ellernu konstante 04

Parolo de spertulo
Adriano Prado 06

La Sekcio Interne
Provizoreco nedezirinda 16

Reage
Kial kaj kiel konsulti vortaron dum legado 18

Kovrilartikolo
Valoro de bildrakontoj en lernoĉambro 26

Leciono-specimeno
Paroligante la lernantaron 38

Lernolibro, unika en Esperantujo 10

Esperantaj radioelsendoj 12

Neĉeesta supera kurso 30

Esperanto en Hungario 47

Lude kaj lerne 24

Aviztabulo 25

Taksu viajn konojn 34

Fajnoj de la metio 48

Pliriĉigu vian vortprovizon 49



Karaj

Ni lernu kaj ellernu Konstante

Per tiu ĉi numero Brazilei fariĝas unujara. Alivorte, ĝi sukcesis postvivi laborigan eksperimentan stadion. Ni konstatas, kun ĝojo, ke la enhavo de la revuo iel ekkontribuas al la plenumado de unu el la celoj de la Sekcio, nome instigo al instrukapablo flanke de la enlandaj kursgvidantoj. Tio sendube postulas pli kaj pli da laboro kaj sekve pligrandigon de la redakta teamo.

Ni havas grandan esperon, tamen, ke per tiu instrucela eldonagado iom post iom ni altiros la atenton kaj simpation de esperantistaj pedagogoj kaj edukistoj disaj tra nia kontinenteca lando. Kiom multe tiaj homoj povas kontribui, per siaj spertoj, al la plibonigo de la revuo!

Grandan esperon ni ankaŭ nutras koncerne pli konstantan kaj rektan partoprenon de la enlandaj kursgvidantoj mem, ĉefkialo de tiu ĉi publikigaĵo.



Myllyses Baldez

Geinstruistoj




Kiel anoncite, ni aperigas ĉi-numere la unuan parton, el entute tri, de speciala artikolo pri la valoro de bildrakontoj en lernoĉambro (p. 26). Kun ĝojo ni prezentas artikolon de Prof. Sylla Chaves reage al artikolo, pri vortara konsultado, aperinta en la antaŭa n-ro de la revuo (p. 18). Nin ankaŭ regalas per speciala artikolo la universitata profesoro Paulo Nascentes, el la urbo Braziljo (p. 38). Ĉu vi volas plibonigi vian parolfluecon? Legu la sugestojn de nia radio-amanto José Dias Pinto el la urbo Santo André, en San-Paŭlo (p. 12). Alia maniero perfertigi viajn sciojn pri la lingvo estas partopreni en la neĉeestaj supera (p. 37) kaj perfektiga (p. 10) kursoj nuntempe disponeblaj en la interreto.

Kiel ankaŭ anoncite, vi trovos sur p. 34 la rezulton pri traduko-defio komentitan de nia spertinta tradukisto Paulo Sérgio Viana. Mankas entuziasmo en via poresperanta agado? Konatiĝu kun la ĉi-numera intervjuito, la juna studento pri pedagogio Adriano Prado, (p. 6).

Laste, ni invitas vin iom pripensi la kandidatiĝ-alvokon (p. 16) aŭ sugesti solvon por la nedezirinda gvidprovizoreco de la Sekcio.

Agrablan kaj instruamuzan legadon!



Adriano Prado

Juna studento, kiu loĝas en Lorena, ŝtato San-Paŭlo, kaj frekventas en sia urbo la lastan jaron de Fakultato pri Pedagogio – FATEA.



Li estas ankaŭ Esperantisto de kelkaj jaroj, kaj foje ĉeestas renkontojn de Esperanto en la Paraiba Valo, foje Brazilajn Kongresojn de Esperanto, kaj konservas bonajn rememorojn pri la Internacia Junulara Kongreso okazinta en 2002, en la urbo Pato-Branko, ŝtato Paranao.

BRAZILEI demandis lin pri liaj pensoj kiel studento.

spertulo

Brazilei: Kio kondukas junan brazilanon, nuntempe, al studado de Pedagogio?

Adriano: Persone mi spertis ion, kio impresis min: iam instruistino asertis al mi, ke “se oni povas ŝanĝi la mondon, tio estu per Edukado”. Mi estis tiam 18-jara kaj jam antaŭe mi pensis pri tio. Tiu aserto igis min decidi pri tiu kurso.

Brazilei: Laŭ via nuna persona koncepto, kio estas Edukado?

Adriano: Ĝi estas laborilo. Por konstrui tablon, oni bezonas segilon kaj martelon. Por konstrui domon, oni bezonas brikojn kaj cementon. Por konstrui ian pli homecan socion, oni bezonas la ilon Edukado. Se la ilo estas bonkvalita, eblas nutri esperon.

Brazilei: Kion vi atendas de la labormerkato?

Adriano: Mi intencas frekventi postdiplomigan kurson pri lerneja administrado, en la proksima jaro. Mi jam laboras kadre de municipa reto kiel instruisto por etaj infanoj, tial mi planas labori estontece kiel administranto. En Brazilo, ĉi tiu posteno tre dependas

de personaj indikoj – kion mi konsideras malbona, ĉar ne ĉiam kompetenteco estas la nura elektokriterio.

Brazilei: Kial brazilaj instruistoj tiel multe plendadas?

Adriano: Jen du flankoj de monero. Unuflanke, neglekto kaj malzorgemo ĉe politikuloj koncerne Edukadon: oni investas multe kaj misadministras la investon. Aliflanke, tio ne pravigas nesufiĉan sindediĉon de la instruisto.

Brazilei: Kio estas pli grava: ĉu gepatroj aŭ instruistoj?

Adriano: Kio plej gravas estas bonaj ekzemploj.

Brazilei: Ni scias, ke vi estas aktiva en la katolika junulara movado. Kiu estas la graveco de religiaj komunumoj en Edukado?

Adriano: Ĝiu religio pozitive influas la formiĝadon de infano. Speciale la katolika, kiu prezentas akceptemon al infanoj: “Venu al mi la infanoj...” Mia laboro en katolika medio estas enkalkulata kiel staĝo por la fakultato, malgraŭ ke ĝi okazas en nelerneja institucio.

Brazilei: Antaŭ kelkaj monatoj, okaze de nia vizito al via urbo, vi tre lerte montris la esprimeblon de gestolingvo (LIBRAS, portugale). Tiu lernobjekto estas deviga por studentoj de pedagogia kurso, kaj vi plenumas ĝin tre entuziasme. Ĉu vi planas ion specialan pri la uzo de tiu esprimilo?

Adriano: Mi intencas, estontece, plibonigi ian tutmondan gestolingvon, ion kiel bildolingvon, kiu efikas regione kaj ankaŭ tutmonde. Sed unue mi bezonas multe lerni kaj bone koni la brazilan gestolingvon LIBRAS, lerni pliajn tiaĵojn kaj poste alpaŝi al ia ebla Esperanto de gestolingvoj... Jen mia plano.

Brazilei: Kiamaniere Esperanto helpas al via formiĝo kiel pedagogo?

Adriano: Laŭ mi, ĝi estas distingilo. Mi estos pedagogo; mi certas, laŭ larĝvida mondkoncepto, ke ni estas nenio, krom simplaj sableroj en dezerto. Tamen sablero unika danke al Esperanto. Mi ŝatas pensi, ke lernado de Esperanto estas privilegio. Mi insiste invitas geamikojn kaj konatojn eklerni tiun mirindan idiomon, sed ilia respondo estas pli kaj pli nekutima kaj negativa. Por diri la veron, Esperanto estas por malmultaj...

Brazilei: Kion reprezentas Esperanto en Edukado?

Adriano: Ĉe laboro kun etuloj, Esperanto povas esti allogaĵo: kanzonoj, ludoj, interpersonaj ekzercoj, amuzaĵoj. La sonoj de Esperanto, ekzemple, estas tre belaj kaj infanoj ŝatas ilin: "hundo", "elefanto"... Mi instruas al la infanoj bazajn elementojn de Esperanto. Ni, ekzemple, ŝnursaltas kalkulante la saltojn en Esperanto!

Brazilei: En kelkaj esperantaj aranĝoj vi kutimas regali la ĉeestantaron per ludado de gitaro, kiun vi uzas ankaŭ lernoĉambre. Bonvolu paroli iom pri via sperto kun muziko kiel dikaktika ilo.

Adriano: Mi uzas muzikon kiel laborrimedon, kaj mian gitaron kiel allogaĵon, ion plian en lernoĉambre. La gelernantoj sentas sin ravitaj pro la muziko, ili ĉiam ŝatas kunkanti. Temas pri miksado ebla kaj farebla. Kiel instruisto, mi ĝojinstigas la gelernantojn ĉiam serĉi novajn aferojn, alivorte, mi impulas la sciadon per muziko. Ekzemple, komence de la lernojaro, ni kutime prezentas al niaj gelernantoj la alfabeton, ne plu literon post litero, sed ĉiujn literojn. Imagu muntadon de puzzle kun mankantaj pecoj! Mi supozas, ke ne estas facile al ili parkerigi ĉiujn 23 literojn de la portugala alfabeto, sed, per enkonduko de kanzonoj, tiu parkerigo iĝas pli facila kaj agrabla. Mi ankaŭ uzas la kanzonojn okaze de distraj momentoj kaj kiel malstretiĉilon.

(Daŭrigota sur la sekva paĝo)



Fotoj: Paulo S. Viana

Brazilei: Kiel vi konatiĝis kun Esperanto?

Adriano: Mi estis ĉirkaŭ 12-jara. En Lorena funkcias junulbrigado, ia instanco de la ĉi tiea urbodomo por trejnado de junuloj kaj adoleskantoj sinpreparantaj por la labormerkato. En tiu sidejo ĉiam okazas perfektigaj fakkursoj, kies prezo estas pli-malpli 10 realoj. Mi neniam interesiĝis pri ili, ĝis iun tagon, legante la programon de la kursoj, mi vidis, ke unu el ili estas senpaga. Mi pensis: ĝuste tiun mi ĉeestos! Povas ŝajni amuze, ke mia esperantistiĝo tiel komenciĝis; mia amo al Esperanto tamen iom post iom pligrandiĝas kaj ĝi vivas en mia koro nun kaj por ĉiam.

LERNOLIBRO, UNIKA EN ESPERANTUJO.

Jader Rodrigues da Silva



Vojaĝo en Esperanto-Lando, de Boris Kolker, estas lernolibro unika en Esperantujo. Ĝi konsistas el dudek-ses lecionoj, kiuj enhavas, ĝenerale, po kvar tekstojn, kiuj ligas la legantojn iom post iom kun fragmentoj el la ĉefaj Esperantaj historio, kulturo, literaturo kaj movado.

Ĝiaj lingvaj praktikoj nepre skribigas la lernantojn kaj tiel, tute nature, naskiĝas en ĉiuj la deziro verki, literaturumi, movadi, prelegi kaj agi ne nur per, sed ankaŭ por Esperanto. Tio ankaŭ ŝuldiĝas al la fakto, ke la aŭtoro komuniĝas kun siaj lernantoj pere de apartaj kromaj kaj klarigaj tekstetoj, kiuj laŭgrade de la “vojaĝo” influas tre pozitive sur ilin. Tiuj ĉi tekstoj, skribitaj sur oranĝkoloraj fonoj, kunligas ĉion kaj ebligas elvidi kiel tutaĵo kohera kaj harmonia, ĉiulecione. Kaj ni ne forgesu: ili agas precipe kiel instigiloj, por ke ĉiuj, atentoplenaj, antaŭen sekvu, observante novajn pejzaĵojn, sed kun ĝojo, plezuro kaj, foje, eĉ kun gajo.

Vojaĝo en Esperanto-Lando estas libro nemalhavebla kaj leginda por la esperantistaro. Kial? Ĉar multfoje, pro diversaj senkulpigaj kaj kialoj, e-istoj faras siajn unuajn paŝojn Esperantuje pere de nura baza kurso kaj de ĉeesto en kelkaj E-aranĝoj kaj poste ili ne plu studas, nek lernas, nek movadumas kaj eĉ legas nenion nialingve.

Krome, ekzistas nenie oficialigitaj beletraj kursoj pri Esperanto, kaj lingvaj seminarioj okazas malofte ie, en foraj landoj por la plimulto el la samideanaro. Tiel reliefiĝas verkoj tiaj, kiel tiu moderna kaj enhaviĉa verko de Boris Kolker.

Vojaĝo en Esperanto-Lando estas lernolibro unika ankaŭ tial, ke ĝi prezentas E-on kiel vivan estaĵon, ne kiel senkoloran kaj sekan gramatikaĵon. Oni ne forgesu, ke naturaj lingvoj konsistas, super ĉio, el vivaj tekstoj kaj tiaj abundas en ĝi.

Krome, se vi sentos, ke en via vojaĝo mankos konduktoro, vi ja povos kontaktiĝi kun li, poŝte aŭ interrete kaj veturi sub lia kompetenta kaj atenta gvidado, ĉar Boris Kolker ne nur organizas la vojaĝon, sed ankaŭ sin proponas gvidi ĝin ĉiam, kiam de li vojaĝanto petos helpon.

Jader Rodrigues da Silva estas ŝtatoficisto kaj licenciulo pri la “brazila” lingvo. Kiel lernonto de Interlingvistikaj Studoj en Poznano, Polujo, venontjare, li, serĉe de perfektigaj E-kursoj, komence de ĉi tiu jaro, trovis, interalie kaj interrete, informojn pri Internacia Perfektiga Koresponda Kurso – IPKK, kies kreinto, Prof. Boris Kolker, b_kolker@yahoo.com, ĝin gvidas retpoŝte.

Vojaĝo en Esperanto-lando. Boris Kolker. 3-a eld. Roterdamo: UEA, 2005. 280p. ISBN 9290170333

ESPERANTAJ RADIOELSENDOJ

KIEL ALDONA LERNINSTRUMENTO

José Dias Pinto

Kelkaj enbrazilaj lernejoj de la angla lingvo havas la celkongruan kutimon kontrakti lingvo-instruistojn denaske anglalingvajn aŭ almenaŭ vivintajn minimume unu jaron en lando, kies lingvo estas la angla. Ĉar jam dekomence oni lernas rekte en la lernota lingvo, jam de tiam la lernantoj kutimiĝas je malsamaj prononcoj kaj akĉentoj, pro la malsama medio en kiu la instruistoj asimilis ĝin kaj per ilia alterniĝo tra la kursaro.

En tia kurso aperis iam juna instruisto ĉirkaŭ dekokjara, kies maniero paroli la portugalan montris lian san-paŭlan brazilanecon. Kiam li komencis paroli la anglan, oni konstatis, ke li flue parolas ĝin, kun usona akĉento. Por kontroli la supozon, ke en Usono li lernis la lingvon, oni demandis lin pri tio. Li respondis, ke li neniam estis ekstere de Brazilo. Scivoleme iu demandis lin, kiel li lernis la lingvon. Li diris, ke la ĉefa faktoro de lia sukceso estas lia enamiĝo al la angla – eĉ

antaŭ ol koni ĝin – kaj la pluon faris la spektado/aŭskultado de filmoj, unue dublitaj kaj poste ne plu. Kaj, kompreneble, la persiste konstanta engaĝiĝo en la lernado.

Koncerne la amon al la lingvo, esperantistoj estas laŭ supoze en la sama situacio. Mankas al ni nur adekvataj filmoj por ke ni samniveleĝu kun tiu junulo. Kompense ni havas Interreton kaj radio-elsendojn.

Esperanto daŭre estas pli skribata ol parolata lingvo kaj probable ankoraŭ longe restos tia. Oftas inter ni tiuj, kiuj atingas komprenon de entekstaj vortoj aŭ frazoj, sed kiuj tamen apenaŭ preterkontaktas la kernon de la temoj. Multaj “esperantistoj” kontentiĝas per tio, ke ili povas legi tekstojn kaj “kontentige ĝuste” kompreni ilin. Ili do iagrade asimilas la lingvon nur pasive kaj apenaŭ sukcesas verki tekston en ĝi. Se diri pri la aktiva parola uzado de la lingvo, la afero iĝas multe pli misfunkcia.



Ili hezitas, balbutas, stumblas, mise esprimiĝas.

Kiam mi vizitis mian unuan E-kongreson – Brazila Kongreso de Esperanto – en Niterói, en 1957, ege surprizis min la fakto, ke la movadaj eminentuloj de Rio de Janeiro respondis miajn kaj alies neesperantajn demandojn en la portugala. Estis inter ili aŭtoroj de vortaro kaj lernolibroj. La grupo kiu plej libere uzis la lingvon estis tiu de San-Paŭlo. Mi ne povis ne pensi pri mia kapablo paroli fluete pri simplaj aferoj post nur trimonata memlerna studado de Esperanto, kiam mi hazarde renkontis la unuan esperantiston. Tiu ĉi prezentis min al tri elstaruloj de la tiama portugala movado, du el ili akademianoj: Luzo Bemaldo kaj Saldanha Carreira. Mi estis bonŝanca, ke mi povis dialoge debuti kun tiaj homoj. Tio estis por mi grandioza sperto kaj, kompreneble, granda stimulo.

Aliaj esperantistoj komencis aperi en mia naskiĝurbo jam kiam mi mem – antaŭ ol veni al la fino de mia pormemlerna libro – ekinstruis ilin: tri amikoj. Antaŭ la menciita impona debuto en Lisbono, mi estis jam multfoje dialoginta kun spegulo kaj kun miaj lernantoj, realaj kaj imagitaj.

Malgraŭ tio, ke la tuta esperanta prononco povas esti klare reprezentata per la portugallingvaj karakteroj kaj vortekzemploj, mi volis, antaŭ ol ekinstrui, esti certa pri la adekvateco de mia prononco. Mi komencis do aŭdi radioelsendojn de pariza radiostacio, tiam dissendanta ĉiutagan dufojan dekkvinminutan programon. Tio donis al mi okazon aŭdi diversoriginajn esperantistojn kaj konstati, ke diferencoj ja ekzistas sed nenio malhelpanta la komprenon. Komence mi apenaŭ komprenis pri kio ili parolas, sed mia komprenkapablo rapide evoluis al la, se ne plena, almenaŭ relativa kompreno de tio, kion ili diras. Notoj helpis min serĉi poste en vortaro klarigojn por miaj duboj. Esperanto havas ja la grandan avantaĝon, ke en ĝi la fonetika transskribo de vortsono estas facila, eĉ se oni ne konas la traktatan vorton. Tion permesas la preskaŭ absoluta unusoneco de

ĉiu litero, malgraŭ la ne ĉiam tre subtilaj variantoj de kelkaj sonoj, influitaj de etnaj lingvopremoj. Radioelsendoj estas bona trejnilo por kompari kaj koni tiujn realajn, sed ja nemiskomprenigajn diferencojn.

le mi legis pri rekomendando de la prononco de centreŭropaj esperantistoj, tiuj malantaŭ la tiama "ferkurteno", kiujn mi fojfoje aŭdis per la pariza radio. Mi prenis ilian parolmanieron kiel modelon kaj pri ĝi instruis miajn tiamajn lernantojn.

Kiam mi komencis esti kapabla relative libere esprimiĝi en Esperanto, mi plivolis, inter geesperantistoj, uzi ĝin anstataŭ la portugalan. Responde al tio, ĉu ĝi ne rivelas miaflankan parademon, mi diris, ke ne por paradi, sed por kaŝi ion mi faras tiun elekton. Se mi parolas en Esperanto, la plejparto el la aŭskultantoj devas streĉi la atenton al mia maniero paroli kaj pro tio ne povas konstati la eventualan senenhavon de la parolado. Pro la atento pri la kielo oni preteratentas la kion. Estus tute alia afero, se mi alparolus kutimajn radio-aŭskultantojn, ĉefe tiujn kutimiĝintajn aŭdi plurpersone prezentatajn programojn kun temoj, intervjuoj, prelegoj,

muzikaĵoj, historiaj kaj aktualaj temoj, kulturaj aferoj, artaj, turismaj. Al tiuj oni havu ion por diri.

Mi plurfoje aŭdis komentariojn kaj citaĵojn el mesaĝoj de radio-aŭskultantoj plendantaj pri la troa parolrapideco de la programo-prezantoj. Laŭ ili, tiu rapideco ne permesas plene kompreni la pritraktatajn temojn. Helpe al ili, la redakcio de la E-programoj de Radio Polonia aperigas sur sia interreta paĝaro tekstojn el parto de la programoj. Ĉi tiu rimedo permesas al la neplenlertaj esperantistoj lege akompani la parolojn.

Ĉar la programoj estas disponeblaj dum dek tagoj, oni povas elekti la konvenajn tagon kaj horon por la legado/aŭskultado. Kaj oni povas libervole ripeti tion aŭ eĉ gardi registron de tiuj programoj por posta aŭdado aŭ aŭdigado al amikoj kaj lernantoj.

Verdire la fojfoje priplendita rapideco estas plene normala por tiuj iom kutimiĝintaj aŭskulti la lingvon de flukapablaj esperantistoj. Kompreneble al komercantoj tio ne eblas, sed progresintoj povas uzi tiun ilon por iom-post-ioma evoluado al plena komprenkapablo. Tio

ebligos al ili plu lerni ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ pri la traktataj temoj. Tio estas adekvata ŝtupo por salti el la pasiva kompreno al la aktiva uzado de la lingvo. La aktiviĝo dependas de onia sinteno al Esperanto kaj certe

ankaŭ de la intereso por la temoj. Oni devas konscii, ke ĉiuj lertoj postulas ekzerciĝojn, spertojn kaj persiston. Des pli se temas pri lingvo – eĉ se la malplej malfacila – kiun oni deziras senti kiel sian. Pri Esperanto tio eblas.

De kelke da tempo tradiciaj radio-elsendoj estas disponeblaj ankaŭ en la interreto. Vizitinda retejo estas <www.radioarkivo.org>, kie retuzantoj povas elŭti E-elsendojn de pluraj radiostacioj.



Alia maniero aŭskulti E-elsendojn estas per posdkasto, ia perreta radiostacio, kies sondosieroj estas aŭtomate aboneblaj. Atentu, tamen, ke por aboni tiajn sondosierojn estas necesa antaŭa instalado de specifa programo, nome podkasta abonilo (iTunes, Juice, RSSRadio, ktp.). Se oni ne volas aboni podkastajn E-elsendojn, oni povas viziti la retejon de la koncerna radiostacio kaj tie rekte elŭti la sondosierojn por posta aŭdado.

Sekvas kelkaj ligiloj de podkastaj E-elsendoj:

Pola Radio: <http://www.polskieradio.pl/eo>

Radio Verda: <http://www.radioverda.com/>

esPodkasto: <http://esperan.to/podkasto/>

Ĉi Tie Nun: <http://www.zervic.com/chitienun>

Varsovia Vento: <http://www.republika.pl/viavento/aktuale>

Radio Aktiva: <http://radioaktiva.esperanto.org.uy>

José Dias Pinto estas konstanta kaj bonfara partoprenanto en la brazila esperanta movado ekde sia alveno el Portugalio en 1951. De multaj jaroj li prizorgas la korespondajn kursojn de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP), de kiu li estas honora membro (1981).

La Sekcio

Provizoreco nedezirinda

Preskaŭ unu jaro forpasis de kiam la gvidado de la Sekcio fariĝis provizora. Por ILEI tia gvidstato certe ne estas agrabla, ĉar tiu internacia organizaĵo estas jure registrita kaj tial bezonas agadi sub minimumaj kondiĉoj, postulataj de la leĝaro en Nederlando, kie situas ĝia oficejo.

Tial ni, la provizora skipo, je la dua fojo, invitas la membraron prezenti kandidaton por la posteno de sekciestro, kies mandato daŭras tri jarojn kun reelektebleco. La kandidato devas esti membro de ILEI de almenaŭ unu jaro kaj resti tia dum sia mandato. Nuntempe, danke al la interreto kaj al iom-post-ioma enretigita agado de la Sekcio, malproksima estrado de nia laborgrupo estas ebla.

Se vi bezonos pliajn informojn por helpi al via decido, bonvolu kontakti nin rete aŭ poŝte (vidu adresojn en la kolofono).



www.ileibr.org



www.ileibr.org/brazilei

Interne

Brazila Sekcio de ILEI kreiĝis en 1975 kaj, dum multaj jaroj, restis sub la gvido de nia karmemora pedagogino Elvira Fontes (Honora Membro de UEA). Lastajn jarojn prizorgis ĝin la sekciestroj Prof. Marcos Zlotovich (2003 – 2005) kaj Prof. Antônio Felix (2006 – komence de 2007).

Nuntempe la Sekcio konsistas el:

- ĉefa retejo
- biblioteko
- revuo Brazilei
- diskutlisto ĉe Jahoo-komunumo
- retbutiko

Sekvas aparte bilanco de la Sekcio koncerne la jaron 2007. En tiu raporto ne estas inkluzivitaj la eldonkostoj de Brazilei, kiu estas subvenciata de eldonejo Oportuno, unu el la partneroj de la Sekcio.

Gajajn festojn kaj sukcesan novjaron!
La provizora skipo



http://br.groups.yahoo.com/group/ilei_brazilo



<http://ileibr.org/xoops/modules/rmms>



[www.ileibr.org/butiko
Brazilei](http://www.ileibr.org/butiko/Brazilei)

Prof. Sylla Chaves

KIAL kaj KIEL



UZI VORTAROJN DUM LEGADO

Inspirite en libro de J. Rubon kaj I. Thompson, Joseo Tenorjo verkis interesan artikolon, priskribante artifikojn por eviti konsulton al vortaro dum legado. Nur ŝajne mia nuna artikolo kontraŭas iliajn dirojn. Mi fakte akceptas ilin, ĉar supozeble ili baziĝas sur premisoj, kiuj bedaŭrinde estas veraj, sed ne bezonas esti por ĉiam tiaj. Jen la premisoj, kiujn mi konsideras implicitaj en ilia rezonado:

- 1** En lingvolernado estas du malagrablaj sed necesaj taskoj – lerno de gramatiko kaj konsulto al vortaroj; kaj du agrablaj taskoj – legado kaj interparolo. Lingvolernantoj pagas la prezon por frandi la bongustaĵojn. Ju pli malmulte ili pagas, des pli bone por ili. Kaj ju pli multe ili frandas, ankaŭ des pli bone. Laŭ tiu logiko, la proponataj

artifikoj estas bonegaj. Kaj bedaŭrinde la plimulto el la vortaroj, kiujn oni trovas, (ne nur Esperantaj, sed ĉiulingvaj) estas malagrablaj eĉ por konsulto.

2 La pritraktata frandaĵo devas esti legata nur unufoje – kun aŭ sen vortaro. La plurfoja legado de unu sama teksto ne estas kutima. Eble tiu dua premiso estas vera por la plimulto el la lingvolernantoj, por kiuj vortaroj estas ĝenaj. Ne por mi. Aŭ teksto ne alportas sufiĉan “nutraĵon”, kaj mi legas ĝin rapide, oblikve, saltante kelkajn partojn, por rapide atingi la ĉefpunkton, la klimakson aŭ la konkludon. Aŭ, kontraŭe, mi vere frandas la tekston en si mem, kaj legas ĝin plurfoje: kuntekston, vortojn kaj nuancojn.

3 Lingvolernanto legas fremdlingve ducele: por lerni kaj por amuziĝi, kaj faras tion samtempe. Fakte, tiuj estas la ĉefaj celoj de tiaj legadoj. Tamen, se la legaĵo estis sufiĉe bone elektita, oni povas legi ĝin plurfoje, en malsamaj manieroj.

KONSULTO AL VORTAROJ ESTAS ĜENERALE MALAGRABLA TASKO

Tio okazas pro pluraj kialoj, el kiuj mi ekzamenos la ĉefajn:

1 ➤ Portugallingve oni nomas vortaroon “patro de la azenoj”. Ŝajnas hontinde konsulti ĝin. Instruistoj akiris tiun sintenon en sia elementa lernejo, kaj senkonscie transdonas ĝin al siaj lernantoj. Formiĝas senelira cirklo. Anstataŭe, ekde la elementa lernejo, eĉ en la gepatra lingvo, infano devus lerni ami kaj konsulti vortarojn. Nur tiel oni bone lernas nuancojn, nur tiel oni evitas “falsajn amikojn”, nur tiel oni foriras el

la stato de “eterna komencanto”. La konstatebla fakto estas, ke azenoj fuĝas de vortaroj kaj kleruloj konsultas ilin. Ju pli oni lernas lingvon, des pli oni konsultas vortarojn, por trovi la vorton, kiu plej ĝuste tradukas oniajn nuancitajn pensojn.

2 ➤ La plimulto el la vortaroj (precipe dulingvaj) malmulte helpas. Tre malofte similaj vortoj signifas ekzakte la samon en du lingvoj. Eĉ en lingvoj tiel parencaj, kiel la portugala kaj la hispana, almenaŭ la nuancoj de la egalaj vortoj estas malsamaj. Pro nesufiĉaj aŭ fuŝaj klarigoj en niaj dulingvaj vortaroj multaj malnovaj esperantistoj ankoraŭ misuzas vortoparojn kiel **kurioza** kaj **scivola**, **frakasi** kaj **malsukcesi**, **ŝorbeto** kaj **glaciaĵo**, uncio kaj jaguaro, kaj plurajn aliajn.

3 ➤ La plimulto el la lingvolernantoj konsultas nur unu dulingvan vortaron, kaj neglektas serĉon en unulingvaj, kvankam ĉi-lastaj multe pli taŭge precizigas la serĉatajn signifojn. Se legantoj lernis malami vortarojn, imagu, kiel malbone estus por ili konsulti tri vortarojn anstataŭ unu! Tamen tiu triobla konsulto estas plurfoje necesa: en la fontolingvo, en la cellingvo kaj en la ponto inter ili. Nur tiel eblos bone kompreni kaj (kiam necese) trafe traduki.

TRI VORTAROJ ESTAS NUR LA AKCEPTEBLA MINIMUMO

Por tiuj, kiuj volas bone kompreni tekston, tri vortaroj estas nura minimumo. Konsulto en la fontolingvo montras, ke multaj legataj vortoj havas plurajn signifojn, kaj permesas ekkoni la ĝustan signifon de la vorto en la teksto. Se la dulingva vortaro estas almenaŭ mezbona, ĝi montras la plurajn tradukojn, kiujn tiu vorto havas, por ke oni serĉu ilin por elekto en la tria vortaro, en la cellingvo. Tio estas nepraĵo por bona kompreno kaj trafa traduko (kiam necesa).

Krom tiuj tri, aliaj vortaroj povas esti utilaj. Bildigeblaj aĵoj ricevas aldonajn informojn en bildvortaroj. Geografiaj aŭ historiaj tekstoj fariĝas pli klaraj post konsulto al landkarto kaj enciklopedia vortaro. Kaj por fakaj temoj eĉ fakuloj ricevas pliajn informojn en fakaj vortaroj, ne gravas ĉu unulingvaj, dulingvaj aŭ plurlingvaj.

KLERULOJ, KOMENCANTOJ KAJ INSTRUISTOJ

Estas evidente, ke kleruloj multe pli konsultas vortarojn ol komencantoj kaj “eternaj komencantoj”, kiujn kontentigas supraĵa kono de la lernata lingvo. Malgraŭ la relativa simpleco de Esperanto, tiaj eternaj komencantoj abundas inter ni, pro tio ke nia internacia lingvo esta nura ŝatokupo por ili, kaj pro la nemeritataj aplaŭdoj, kiujn ili tro ofte ricevas. Kleruloj pli bone rekonas la gravecon de vortaroj kaj ofte konsultas ilin. Komencantoj ne. Respondecas pri tiu situacio la netaŭgeco de multaj vortaroj (en iu ajn lingvo), la kutima mallaboremo de lingvolernantoj kaj la manko de vortaremo flanke de la instruistoj.

Mi estas konvinkita, ke unu el la ĉefaj taskoj de lingvo-instruistoj, eĉ de instruisto de la gepatra lingvo en elementa lernejo, estas instruado de konsulto al vortaroj. Unue la komencanto devas elekti vortaron taŭgan por sia lingvonivelo. Poste li devas lerni konsulti ĝin. Se la instruisto ne spronas kaj helpas siajn lernantojn tiudirekten, lia instruado estas nekompleta. Ĉiu lingvo estas rilato inter vortoj kaj signifoj, kaj tial vortaro estas almenaŭ tiel grava por lingvolernado kiel legado kaj interparolo.

Esperanto havas aldonan avantaĝon rilate al etnaj lingvoj. Ĝia relative simpla kaj regula gramatiko estas enmetebla en vortaron. Detalaj klarigoj pri finaĵoj, afiksoj, tabelvortoj, prepozicioj kaj konjunkcioj estas aperigendaj en vortaroj, tiel prezentante solvojn por ilia kompreno kaj uzo, foje eĉ pli bone ol gramatikoj. Tiel Esperantaj vortaroj povas esti eĉ pli utilaj ol etnalingvaj. Instruistoj devas elekti bonajn vortarojn por siaj lernantoj, transdoni al ili amon al siaj vortaroj kaj instrui al ili kiam kaj kiel uzi ilin. Bedaŭrinde eĉ kelkaj instruistoj ne scias aŭ ne volas fari tion.



KIAM KONSULTI VORTAROJN

Kiam mi eklernis Esperanton, mi akiris vortareton nomatan FUNDAMENTA RADIKARO KUN PORTUGALA TRADUKO. Mi atente legis kaj studis ĝin, de komenco ĝis fino, kaj senprobleme komencis legi facilajn tekstojn. Ĉiuj vortoj en ili estis utilaj, kaj la elasteco de ilia uzado permesis, ke mi komprenu la tekstojn de la kreemaj verkintoj. Poste mi akiris la malnovan Plenan Vortaron de SAT. Kaj tio sufiĉis, por ke mi multe legu. Eblis rimarki, ke tiu relative malgranda vortokvanto sufiĉis por nuanci la pensojn de la tiamaj spertaj verkintoj.

Poste aperis aliaj verkintoj, instruistoj, gramatikistoj kaj vortaristoj, kiuj preferis komplikon. Kaj la lingvo de Zamenhof fariĝis pli simila al okcidentaj etnaj lingvoj, kvankam por kontraŭstari la lingvajn Goljatojn la sola armilo de Esperanto estas la kunigo de la klareco, riĉeco kaj simpleco, kiujn ĝi ricevis de Zamenhof mem. Bedaŭrinde nuntempe ekde siaj unuaj kursoj esperantistoj ofte lernas adopti aŭ inventi nenecesajn neologismojn...

Influite de la periodo de mia eklerno, mi pretigis du vortarojn destinitajn precipe al legado: Originala Esperanta Bildvortaro kaj *Dicionário do Principiante* (Portugallingva Vortaro por Komencanto). La tutmonda akcepto de la unua estis entuziasmiga. Tamen la dua, destinita al portugallingvanoj, ne havis la atendatan sukceson. En siaj kursoj, la plimulto el niaj novaj samideanoj lernis malami vortarojn kaj nur prenas ilin por serĉi nediveneblan signifon de kelkaj vortoj (ofte malsukcese).





Kiel mi diris, bone elektitajn librojn oni devas legi ne unu solan fojon, sed almenaŭ tri. La unuan, oni legas sen vortaro, eble laŭ la sistemo proponita de Tenorjo, kiu estas tre bona por tiu celo. Ĝi permesas diveni multon kaj akompani la ĉefan gvidlinion de la teksto. Sed ĝi ne estas perfekta. Nuancoj estas perditaj kaj kelkaj falsaj amikoj ankoraŭ ĝenos. Tial la lernado estos nekompleta. De bonaj aŭtoroj la leganto povas ricevi multe pli. Por taŭga lernado necesas legi tiajn tekstojn almenaŭ du aliajn fojojn. En la dua oni konsultas ne unu, sed plurajn vortarojn. En la tria oni ĝuas sen-

vortaran relegon, komprenante ĉion, frandante la nuancojn kaj la supozeble agrablan stilon de la aŭtoro.

KIEL KONSULTI VORTAROJN

Ni supozu, ke niaj vortaroj estis bone elektitaj. Ili ne enhavas ĝenajn preserarojn, neklaraĵojn aŭ neĝustaĵojn. Ili taŭgas por la nivelo de la lingvolernanto. La lernanto do rimarkos, ke teksto pri ŝorbeto ne rilatas al glaciaĵo, ke uncio ne estas brazila besto kaj ke frakaso de biciklo estas multe pli terura ol simpla malsukceso dum biciklado. Se la vortaro taŭgas kaj la konsultanto estas atenta, tiaj problemaĉoj ne okazos.

La kunvortara dua legado povas esti jena:

-  Relegado kun substreko de ĉiuj vortoj nekomprenataj aŭ ne sufiĉe klaraj.
-  Serĉo de la signifoj de tiuj vortoj (uzante, se necese, la tri vortarojn) kaj konfirmo, ke tiuj signifoj taŭgas por la teksto.
-  Transskribo de la vortoj surkajere, dukolumne. En la unua kolumno, la vortoj; en la dua, iliaj difinoj aŭ tradukoj, laŭ la plaĉo de la transskribanto. Tiuj du kolumnoj permesos kovri per kartono la tutaĵon de la vortoj aŭ de iliaj klarigoj.
-  Studado de tiu personeca vortaro. La daŭro de tiu studo dependos de la kapablo kaj intereso de la leganto. Unu horon, unu tagon, unu semajnon... ne gravas. Estu intervaloj por ripozo, ioma forgeso kaj posta reekzerco de la memoro. Unue, rigardante la vorton, oni provu diri ĝian signifon; due, rigardante la signifon, oni provu diveni la vorton.

Kiam ĉiuj vortoj estos enkapigitaj, oni rajtos konsideri, ke la legado estis fruktodona por lernado de novaj vortoj. Kaj vi relegos vian tekston triafoje kaj plenĝue. Ĝi vere taŭgis por lingvolernado. Kaj portis al vi duoblan ĝojon. Pro la altigo de via lingvonivelo kaj pro la plezuro ricevita de bona teksto kun ĉiuj siaj stilaj alportaĵoj kaj nuancoj.

Paperfaldado

Faldi el simpla paperfolio plej divesajn figurojn, el kiuj tiujn de bestoj, estas la ĉarmo de origamio, tradicia japana arto de paperfaldado. Elvolviĝo de kreemo kaj lerteco estas rektaj avantaĝoj de ĝia praktikado fare de homoj ajnaĝaj. La ĉi-numeran tradician paperfaldadon proponis kaj sendis Conceição Rodrigues. Kune kun la revuo sekvas kelkaj paperfolioj por ke vi iom ekzerciĝu antaŭ ol vi ekzercigos viajn etajn gelernantojn.



Hundeto — Vi bezonos: 2 kvadratojn el papero je 10x10 cm, gluaĵon kaj kraĵonon. Uzu paperfoliojn diverskolorajn.

Por faldi la kapon de la hundeto, sekvu la instrukciojn sube. Laŭdezire, desegnu la okulojn kaj poste glue kunigu la du partojn.



Faldu diagonale



Ĝiru la figuron je 90° laŭ la kontraŭa direkto de horloĝmontriloj




Faldu supren laŭlonge de la striita linio



Faldu malsupren laŭlonge de la striita linio

Por faldi la korpon:



Faldu diagonale



Ĝiru la figuron je 135° laŭ la kontraŭa direkto de horloĝmontriloj



Faldu, laŭlonge de la striita linio, enen kaj poste elen



PLIA LERNEJO EMAS ADOPTI ESPERANTON

Plia enlanda lernejo ekinteresiĝas pri Esperanto. La lingvo estos instruata en la Instrucentro Vila Isabel, privata kaj bonfama lernejo situanta en la urbo Tri Riveroj, ŝtato Rio-de-Ĵaneiro. La lecionoj celas lernantojn de la 5-a ĝis la 8-a elementaj klasoj, surbaze de pedagogiaj esploroj raportitaj de la familio Polgár, el Hungario, en la verko "Eduku Geniulon!". Kunordigos la aktivadojn la instruista pri matematiko, Cláudio Bonfante de Oliveira (claudiobonfa@yahoo.com.br), kiu eklernis la lingvon en 1994. La direktoraro de la instrucentro decidis starigi ankaŭ eksperimentan kurson por instruistoj kaj funkciuloj. La kurso konsistas el 30 lecionoj kaj finiĝos ĝis antaŭ la komenco de la proksima lernojar. La celo de la projekto estas igi la tiean lernejan medion favora al la enkonduko de Esperanto.

Informis: Fabiano Henrique kaj Luiz Alberto de Oliveira

BELARTA ALVOKO

La Belartaj Konkursoj de UEA invitas verkemulojn partopreni en la 59-a eldono de la kleriga kaj tradicia evento, kies rezultoj anonciĝos en la 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta venontjare en Roterdamo. La konkurso estas libera al ĉiuj kaj ne nepre ligita al partopreno de la aŭtoro en la UK. Konkursaĵoj devas esti novaj kaj antaŭe ne publikigitaj en ajna formo. Jenaj branĉoj estas proponataj: Poezio, Prozo, Teatraĵo, Eseo, Filmo kaj Infanlibro de la Jaro. La premio-tutaĵo povos atingi pli ol tri mil eŭrojn, se premiiĝos konkursaĵoj en ĉiuj proponataj branĉoj. Detala regularo haveblas ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ĝi legeblas ankaŭ ĉe <http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html>.

Fonto: gazetaraj Komunikoj de UEA

Rondo Familia

http://uea.org/rondo_familia/index.html



Valoro de Bildrakontoj EN LERNOĈAMBRO



Osmear

La neceso registri informojn estiĝis antaŭ ĉirkaŭ 40 mil jaroj per surrokaj pentraĵoj. El tiaj rustikaj desegnoj, kelkaj montris hom- kaj bestoformojn, kiujn oni konsideras nuraj portretoj. Aliaj tamen provis jam rakonti iun eventon, eĉ se per ununura bildo, kies rezulton oni povas ja konsideri ia baza elemento de bildrakontado.

Plurajn jarmilojn poste, ĉirkaŭ 4000 a.K., alia esprimilo multe pli pova kaj ellaborita, nome skribado, iĝis parto de la homa scenejo; sed tiu nova komunikilo estis privilegie alirebla nur al malmultaj, dum bildrakontoj estis kaj restas ia speco de universala esprimilo, unufanke abunde esplorata de militistaj, religiaj, ŝtataj kaj komercaj gvidantoj, aliflanke apenaŭ esplorata de edukistoj, kiel konstateblas sekve.



Osmear

1-a parto

Joseo Tenorjo

?!

Ulysses Baldez



← E N A U C W



Osmar

Eble la plej populara reklamado en bildforma rakonto, en Okcidento, estas la pentraĵaro, kiu montras la kalvarian vojon de Kristo, ĝis hodiaŭ eksponata en katolikaj preĝejoj en la tuta mondo.

Alia vasta uzado de bildrakonto propagandcele okazis en 1949, en Ĉinio, sub la kultura kaj eduka politiko de Mao Tse Tung, kiu popularigis tiun literaturan ĝenron. Laŭ statistiko, inter 1949 kaj 1963 ĉirkaŭ 12.700 malsamaj titoloj de bildrakontoj estis eldonitaj, atinginte la nombron de 560 milionoj da ekzempleroj cirkulantaj tra la tuta lando. Interesa sperto tiukampe okazis antaŭ nelonge en Barato. Ĝis la 1970-aj jaroj, infanoj de tiu lando legis importitajn bildrakontojn kaj, dum la okupacio de la brita imperio, la kulturaj valoroj de Okcidento multe pli ĉeestis en la imagpovo de tiuj infanoj ol la lokaj tradicioj mem. Anant Pai, loka inĝeniero kaj ĵurnalisto, observante la sukceson de bildrakonto, kiam li laboris en la ĵurnalo *Times of India*, proponis al la eldonejo *India Book House*, en Bombaĵo, la ideon publikigi enlandajn epopeajn temojn. Tiel la miljara riĉa parola tradicio de tiu popolo reviviĝis laŭ nove bilda tradicio.

Laŭ konsidero de ekspertizoj pri amas-komunikado, la strategio uzata de usonaj gazetentreprenistoj, fine de la 19-a jarcento, cele



Osmar

multobligi la eldonkvanton de siaj periodaĵoj, estis la enmeto de bildstrioj en la dimanĉajn eldonojn por konkeri la tiaman homamason da enmigrintoj ankoraŭ ne multe familiariĝinta kun la nova idiomo. Indas memori ankaŭ la filmojn, bazitajn sur bildrakontoj, kiuj de tempo al tempo furoras en la tuta mondo, komence de tiuj plej popularaj, kiel *Spider-man* (Araneulo) kaj Asterisk, ĝis tiuj konsiderataj "alternativaj", kiel *Ghost World* (Fantoma Mondo). Interesa beletra iniciato estis la ambicia projekto entreprenita de la argentinano José Luis Salinas, en 1938, adapti aventurajn romanojn al bildrakonto. La rezulto estis verkoj kiel Kapitano Tormento, La Tri Muskedistoj, La Lasta Moikano i.a..

Se teknologie paroli, oni ne povas ne rekoni, ke multaj bildrakontoj anticipe prezentis sciencajn eltrovojn, kiuj hodiaŭ al ni aspektas tre familiaraj: spacesploron (Flash Gordon), poŝtelefonon (Dick Tracy), virtualan mondon (*Fantastic Four* = Fantasta Kvaropo) k.m.a.. Jen plia utilo de bildrakontoj en la edukado de infanoj: plenkreskuloj, kiuj infanaĝe kutimis legi sciencfikciajn bildrakontojn, pli nature akceptas la teknologiajn novaĵojn, kiuj pli kaj pli invadas nian ĉiutagan vivon.



Flash Gordon - Alex Raymond, King Features Syndicate



Dick Tracy - Chester Gould, Tribune Co.

Estas nekalkulebla la kvanto da informfolioj, revuoj, manlibroj ktp, en formo de bildrakontoj, nuntempe produktataj de registaraj instancoj, privataj entreprenoj kaj politikaj partioj tra la mondo, kio montras la povon kaj efikecon de tiu ĉi komunika rimedo. La plej grava monda festivalo pri bildliteraturo, nome Internacia Festivalo de *Bande Dessinée*, okazas ĉiujare en la urbo *Angoulême*, Francio, unu el la landoj, kiuj plej multe apogas la Naŭan Arton. En Brazilo, la Festivalo de *Piracicaba*, okazanta en la samnoma urbo, elstariĝas kiel la plej impona enlanda evento pri la Naŭa Arto, ĉiujare aljuĝante premiojn al artistoj el la tuta mondo. La plej granda enlanda kolekto de bildrakontoj estas senpage konsultebla en *Gibiteca Henfil*, situanta ene de *Centro*



Cultural São Paulo. La bildrakontejo, kiun monate vizitadas ĉirkaŭ 2400 homoj, enhavas 75 mil titolojn.

Malgraŭ tiu historia rekono pri la valoro de bildliteraturo, multaj edukistoj ankoraŭ rezistas al la povo de la Naŭa Arto kiel instruhelpilo. Tiaj edukistoj embuske aplaŭdas instruistojn, kiuj konfiskas bildrevuojn el siaj gelernantoj, kaj inkvizitore aprobas bibliotekojn, kiuj malpermesas aldonon de tiaj revuoj al sia kolekto. Ne estas malproksima la tempo, kiam tiu literatura ĝenro estis konsiderata “kultura rubaĵo”. La tiama ĝenerala kredo afiŝadis, ke bildrakonto povas damaĝi la junulojn per instigado al perforto, praktiko de samseksumado kaj malhelpo al la intelekta elvolviĝo, ĉar bildoj provokas menspigremon.

Nuntempaj esploroj, male, montras, ke legado de bildrakontoj estas multe pli interaga ol spektado de filmo aŭ televidprogramo. La fakto, ke bildrakonto prezentas pli da desegnoj ol teksto ne malpligrandigas ĝian edukatan valoron kaj efikecon. Ĝi nur montras kiel mesaĝo povas alimaniere esti prezentata. Envere, la kunigo de teksto kaj bildo povas esti, laŭ la celoj kaj bezonoj de la edukisto aŭ artisto, tre avantaĝa, ĉar ĝi ofertas vastan diversecon de simbologiaj rimedoj, kiuj povas unuflanke helpi al la intelekta elvolviĝo de la leganto, kaj aliflanke akriĝi ties sentemon kaj artan inteligenton.

Kurioze, multaj tiaj edukistoj nekonscie uzas elementajn principojn de bildrakontado, ekz-e. instruisto pri fiziko, montrante la trajektorion de kuglo per bildserio krete desegnita surtabule! La samo okazas, kiam instruisto pri geografio montras, per bildoj aŭ krete sur la tabulo, la konsiston de nia sunsistemo.

La plej antaŭjuĝa kampanjo kontraŭ iu brazilan bildliteraturaĵon akriĝis antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj, kiam la tiama gazetaro plendadis, ke *Chico Bento*, unu el la bilduloj de la fama brazilano Maurício de Sousa, ne plu uzu la eraran parolon



de kamparano, sed tiun de la normigita portugala lingvo. La plendintoj pravigis sin per tio, ke la bildstriaĵaj figuroj de Maurício povus instigi infanojn erare paroli kaj skribi!



Feliĉe, tamen, ne ĉiuj edukistoj agas tiel antaŭjuĝeme. Iom post iom ili volonte enkondukas bildrakontojn en siajn lecionojn, ĝuste tial ke bildoj estas efikaj perantoj por abstraktaĵoj. Sed, atentu: ne ĉiu bildrakonto estas inda por lernado, samkiel ne ĉiu libro estas inda por legado.

Konante la eblecojn de tiu aparte riĉa literatura mondo, la instruisto povas selekti plej taŭgan materialon por helpi al la instruado de sia lernobjekto. Instruistoj pri la portugala lingvo aŭ historio eble volus enkonduki lernoĉambren bildliteraturajn specimenojn de Asterisk. Historie, cele komenti aspektojn de la galla kulturo; portugale, cele reliefigi la latindevenajn elementojn en la lingvo mem de la gelernantoj.

Unu el la plej urĝaj defioj de nuntempaj edukistoj estas instigi la kutimon al legado kaj skribado. La gelernantoj bezonas lerni kiel legi kaj kiel uzi la informojn akiritajn pere de legado. Kelkaj pedagogoj kredas, ke enkonduko de bildrakontoj en lernoĉambro estas bonega ilo por atingi tiun celon, ĉar tiaj verkoj prezentas lingvaĵon simplan kaj facile kompreneblan por la legantoj.

Iuj povas argumenti, ke novuloj bezonas antaŭe lerni kiel legi bildrakontojn cele profiti el ilia lernebleco. Tia argumento ne estas tute vera. En nia moderna mondo, homoj estas ĉiufланke kaj senĉese bombardataj per ĉiaj vidinformoj: fotoj en gazetoj, revuoj, televidiloj, filmoj, afiŝoj, reklampaneloj k.m.a.. Envere, pro la nuna troa vidallogo, nia vivo pli kaj pli aspektas kiel bildrakonto...



Ĉirkaŭ la mezo de la 19-a jarcento, danke al evoluigo de presarto, niaj bildrakontoj ekhavis pli difinitajn grafikelementojn, el kiuj indas mencii: ĉiu bildo gajnis

limigitan formon, ordinare ene de kadro; vortoj aldoniĝis al la rakonto en formo de parolveziko, cele montri la dirojn kaj pensojn de la bilduloj, kaj en formo de surskribaĵo, ordinare ene de retangulo, por uzo de la rakontisto mem.

Eventuale iu elementa kono pri la strukturo de bildrakonto iĝas necesa por kelkaj homoj (vidu teksto-fenestron sube).

PAROLVEZIKOJ



La plej tradicia estas tiu en formo de balono. Foje ĝi aperas kiel krampo (A), foje kiel simpla streko (B).



Lego-orientiĝo de parolvezikoj:

En okcidentaj bildrakontoj, legado komenciĝas de maldekstre dekstren kaj de supre malsupren, dum en tiuj orientaj, ordinare ĝi komenciĝas de dekstre maldekstren. Tiu lego-sekvo validas kaj por la tuta paĝo, kaj por iu aparta bildokadro, ene de la paĝo.

VIDAJ METAFOROJ

Tiaj videfektoj estas abunde esplorataj de bildrakontistoj por esprimi iujn situaciojn en la rakonto sen neceso uzi tekstojn. La plej klasika vida metaforo, en bildrakontoj, eble estas la desegno de lampo por montri, ke al ies kapo venis ideo (a). Jen aliaj vidaj metaforoj por montri: menfidon (b), koleron (c), ploron (ĉ), surprizon (d), enamiĝon (e) kaj monavidon (f).



Sed kio pri uzado de bildrakontoj en lecionoj pri fremdaj lingvoj? Mi ne vidas alian pli fekundan kampon por enkonduko de tia helpilo. Gelernantoj ĉe lernado de fremda lingvo restas analfabetoj en la lernata lingvo, ĝis ili parole, aŭ almenaŭ lege, ekregos ĝin. Tial, avantaĝoj de bildrakonto por tiaj komencantaj uzantoj de kroma lingvo estas multaj, inter kiuj ni citu jenajn: 1-e) ĉar la rakontoj estas pli bildgvidaj ol tekstogvidaj, tio per si mem

jam garantias komprenon de duono de la komunika situacio; 2-e) la parolo de bildherooj estas malpli beletra, tial amantoj de bildrakontoj alproprigas al si esprimojn pli proksimajn al tiu de la ĉiutaga uzata lingvo; 3-e) bildrakonto abundas je ripetitaj esprimoj, kiuj helpas al ia regula kaj fiksa uzado de la lingvo; 4-e) multajn esprimojn kaj parolturnojn akompanas bildigitaj situacioj, kiuj helpas al la parkerigado de tiuj novaj vortoj flanke de la legantoj; 5-e) bildrakontojn oni povas legi plurfoje, distre kaj plezure.

En la tria parto de tiu ĉi artikolo, ni prezentos kelkajn sugestojn por praktike enkonduki bildrakontojn en vian lernoĉambron. Dume, en la dua parto de la artikolo, vi konatiĝos kun la produktado de esperanta bildliteraturo, originala kaj tradukita.

Kuriozaĵo pri la brazila bildliteraturo: la ĝenro, kiu populariĝis tra la lando kiel *Gibi*, pruntis sian nomon el bildrevuo lanĉita en 1939. Tiumtempe *gibi* signifis bubeton, nigruleton, sed kun la paso de la tempo la ligo de la nomo kun la revuo iĝis tiel nedisigebla, ke de tiam ĝi fariĝis ia speco de sinonimo.



Gibi Semanal - Rio Gráfica Editora

Alilandaj ekvivalentoj

Portugaliao: *bandas desenhadas*; **Brazilo:** *gibi, história em quadrinhos*; **Usono:** *comic book, comic strip, graphic novel*; **Ĉinio:** *lianhuanhua*; **Argentino:** *historietas*; **Hungario:** *képregény*; **Germanio:** *Bildergeschichte*; **Francio:** *bande dessinée*; **Koreio:** *manhwa*; **Japanio:** *manga*; **Nederlando:** *stripverhalen*; **Filipino:** *komiks*; **Italio:** *fumetti*; **Hispanio:** *tebeos*; **Kubo:** *mañequilos*.

Konsultfontoj

História em Quadrinhos - V Encontro dos Núcleos de Pesquisa da Intercom. Edgard Guimarães; *Estudos Lingüísticos XXXV*. Paulo Ramos, p. 1574-1583, 2006; PROCESOS CULTURALES EN AMÉRICA LATINA - *Quadrinhos, psicologia e espiritualidade: símbolos e mitos estruturam o desenvolvimento psíquico e espiritual*. Cristina Levine Martins Xavier. Pontifícia Universidade Católica - SP; <http://www.universohq.com>; <http://www.ucdb.br/gibiteca/index.php>; <http://gibitecacom.blogspot.com>; <http://www.centrocultural.sp.gov.br/gibiteca/index.html>

Taksu viajn konojn

Rezulto de la traduko-defio n-ro 1

Traduko estas bonega lingva ekzercado; tial ni aperigis tiun ĉi rubrikon, kaj invitis la spertintan tradukiston Paulo Sérgio Viana, kiu afable akceptis la inviton prizorgi la komentojn pri la tradukaĵoj. Inaŭguris la rubrikon ses konkursaĵoj venintaj el ses enlandaj urboj. La konkursaĵo, elektita kiel la plej bona traduko-propono, venis el la urbo Natalo, en ŝtato Norda Rio-Grando, kaj ĝin verkis José Mário Marques, kiu estos regalata per donaco-premio de la verko Dom Casmurro, de la fama brazilano Machado de Assis, en bela traduko de Paulo Viana mem. Plia traduko-defio atendas vian reagon sur la paĝo 36. Limdato por livero de traduko-proponoj: 31/01/2008. Vizitu ankaŭ la retejon <www.ileibr.org/brazilei/traduku.php>.

— “Riobaldo, jen do privataĵo, kiun mi bezonas sciigi al vi, kaj kaŝo ne estas al mi allasata...”

Aŭskultu: mi ne nomiĝas Rejnaldo, envere. Tiu estas nomo apelativa, inventita pro neceso mia, via demando kiala ne bezonatas. Mi posedas miajn fatojn. La vivo faras sep turniĝojn – onidire. La vivo eĉ ne apartenas al onio.”

Li parolis tion sen brusko kaj sen ĉirkaŭtonoj, sed plie haste, kvazaŭ se kun iomo da bedaŭro kaj hontiĝema suspendo.

— “Vi estis infano, mi estis infano... Ni trapasis la riveron en la kanoto... Ni altuŝis tiun ankrejon. De tiu tago ni fariĝis amikoj.”

Tiun fakton, mi konfirmis. Kaj aŭdis:

— “Jen do: mia nomo, ververa, estas Diadorimo... Konservu tiun sekreton mian. Ĉiam, se solaj ni estos, Diadorimo vi devas nomi min, mi diras kaj petas, Riobaldo...”

Traduko-propono sendita de José Mário Marques

KOMENTOJ:

La originala teksto estas bonege elektita: malfacila, aŭdacastila, sed sufiĉe bone transdonebla per Esperanto. La granda defio estas traduki ĝin fidele, gramatike korekte kaj tamen konservante la viglan, vivecan, parol-imitan frazumadon. Perfekte samkolora kiel la originalo certe ne eblas, sed Esperanto kapablas redoni multon. Verŝajne la plej malfacila frazo estas:

"Ele falava aquilo sem rompante e sem entonos, mas antes com pressa, quem sabe se com tico de pesar e vergonhosa suspensão."

Mi proponus:

"Li tion diris sen krudo (aplombo?) kaj sen emfazo, sed prefere haste, kiu scias ĉu per ero da peno kaj honthezito."

Sed la traduko de mi elektita, kiel la plej bona, trafis same (eble pli) taŭgan solvon. Nur tri tradukoj estas tute seneraraj, laŭ gramatika vidpunkto. Aliaj proponis iom netaŭgajn solvojn, el kiuj mi notis kelkajn:

"alnome prihelpa" ("*nome apelativo*")

"miajn subspurojn" ("*meus fados*")

"ĉiam, iĝu ni solaj", "kiam ni estu sola" ("*quando sozinhos a gente estiver*")

"mi ne plu tenas kaŝi" ("*que esconder mais não posso*")

"hontinda prokrasto" ("*vergonhosa suspensão*")

"laŭ oni diras" ("*se diz*")

"antaŭe pli urĝe" ("*mas antes com pressa*")

La traduko numero 3 ŝajnas al mi la plej bona: krom korekteco, ĝi transdonas iom de la stilo de la originalo. Mi mem ne tre ŝatas

(Daŭrigota sekvapaĝe)

necesajn neologismojn en Esperanto; tamen por ĉi tiu okazo, ili bone kongruas kun la neordinara originala dirmaniero. La uzo de aŭdacaj sed pure Esperantaj esprimoj riĉigas la tradukon: “onio”, “via demando kiala ne bezonatas”, “kvazaŭ se kun iomo da bedaŭro kaj hontiĝema suspendo” (en ĉi tiu lasta ekzemplo eble la vorto “se” estas superflua).

Mi forte rekomendas, ke la tradukinto de la konkursaĵo n-ro 3 nepre plu laboru kaj proponu al ni tutan verkon de Guimarães Rosa en la Internacia Lingvo. La tutmonda samideanaro dankos! Gratulon!

Traduko-defio

n-ro 2

“Foi nesse dia, já entrada a noite, com o silêncio em seu redor, que lhe veio a impressão estranha de que a Vanju estava ali na cela. Viu oscilar a chama do candeeiro, como se fosse apagar. Olhou em volta intrigado. Não sentira o sopro do vento. De repente pareceu-lhe reconhecer o cheiro do corpo de Vanju disperso no ar. Dilatou as narinas, numa inspiração mais profunda. Tornou a olhar em volta, ainda mais intrigado. O odor ativo de jardineira molhada, que ela espalhava à sua volta ao sair do banho, ele o sentia agora, nítido, penetrante. Teria vindo de fora, com uma rajada de vento? E por que não o sentira nas outras noites? Mais uma vez viu a chama oscilar dentro da manga de vidro, como se alguém a soprasse de cima para baixo. Um arrepio percorreu-lhe a espinha. Era ela, sim — concluiu ele, de coração alvo-roçado, uma mistura de júbilo e medo no fulgor dos olhos crescidos. Sentou na rede, cerrou as pálpebras. E em tom baixo, convictamente, começou a falar-lhe:

— Sei que você, Vanju, está perto de mim. Não lhe vejo, mas sinto você. Este cheiro é seu. Conheci de longe. Me lembro bem.”

MONTELLO, Josué - *Cais da Sagração*, 4-a eldono, Nova Fronteira, Rio de Janeiro, 1976, p 135.

Neĉeesta supera kurso

Iom post iom esperantaj edukinstancoj ekuzas rimedojn de la nuna teknologia mondo cele ampleksigi la sferagadon de sia laboro. La plej freŝa tia ekzemplo venas el Pollando, naskiĝejo de Esperanto kaj gastigejo de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en 2009, omaĝe al la 150-jariĝo de la kreinto de Esperanto, L.L. Zamenhof.



La malnova kaj fama Jagelona Universitato de Krakovo, en Pollando, de nun ekfunkciigas neĉeestan superan kurson de Esperanto celantan esperantistojn el aliaj landoj. La kosto de la tuta perreta 90-hora kurso, kun atestilo, estas: 227 EUR (por B,C-landanoj, inter kiuj inkluziviĝas brazilanoj) kaj 454 EUR por A-landanoj, laŭ UEA-klasifiko. Fine de la kurso, la sukcesaj ekzamenitoj ricevos dulingvan atestilon "Certyfikat" de la universitato. Tiu "Certyfikat" tamen ne validas kiel diplomo, avertas la respondeculo pri la kurso, profesorino Maria Majerczak: "Ĝi estas atestilo konfirmanta lingvoscion je difinita nivelo".

Maria Majerczak estas filologo (lingvistiko, literaturesplorado, metodiko pei instruado de fremdaj lingvoj), universitata instruisto, profesie specialiĝanta pri formado de estontaj lingvoinstruistoj, E-instruisto kun ĉ.10-jara sperto pri E-instruado en tiu universitato, instruisto pri Esperanto-fako en Universitato de Poznan, Pollando (metodiko de E-instruado).

Dum preparado kaj realigado de E-instruado, ŝi foje uzas siajn kapablojn aŭ kvalifikojn en la sferoj de muzik-komponado, kantado, koregrafio, dancado, reĝisorado, aktorado; krome, ŝi utiligas ankaŭ ĵurnalismajn kaj movadajn spertojn.

Por pliaj informoj, vizitu la retejon <<http://www.esperanto-reto.org>> kaj surklaku la ligilon <Studenta Scienca E-Rondo en Jagelona Universitato> aŭ kontaktu rekte la kurso-instruistinojn per jena retadreso <esperanto.instruado.jag.univ.pl@gmail.com>.

Paroligante la Lernantaron

Paulo Nascentes

BARBOZA, Jozias. *Esperanto por lernejoj klasoj*: paroliga metodo kun ekzercaro (libroj 1 kaj 2). Braziljo: Eldono de la aŭtoro, 2007.

Ekslernantoj neparolantaj Esperanton post kelkaj kursoj, ĉu vi konas iun tian? Eternaj komencantoj ĉiam serĉe al novaj konversaciaj kursoj, ĉu ili videblas en kluboj kaj esperantaj asocioj? Gesamideanoj tielnomataj “saluton-ĝis-revido” troveblas en kongresoj kaj ie ajn, ĉu? Jen poste, tamen, ĝuste tiuj homoj venas entuziasme kaj disvastigcele garantiante, ke “Esperanto estas tre facila lingvo”, eble unu el malmultaj frazoj lernitaj. Kelkaj tiaj fervoraj esperantistoj multfoje bonege parkere scias menci la famajn 16-gramatikajn regulojn de Esperanto. Neniel tamen ili sukcesas babili kun eksterlandaj gesamideanoj alvenintaj al E-klubo. Kial?

Ĝus menciitan fenomenon oni devas pripensi, konsiderante ĝian relativan oftecon. Indas tamen studi ĝin kaj proponi lernovojn kongruan kun la instruado de L2. Instrui duan lingvon funde malsimilas al instruado de gepatra lingvo. Nia celo estas analizi kelkajn **lingvajn kaj pedagogiajn principojn**, kiuj povas faciligi la taskon instrui profite duan lingvon. La speciala lingva strukturo mem de Esperanto ebligas specialan manieron ĝin instrui, sen malkonsidero al ĝeneralaj principoj bone konataj de fakaj esploristoj.

SISTEMO, NORMO KAJ UZO

Jen la unua specialaĵo de Esperanto kompare kun etnaj lingvoj. En Esperanto, pli rapide ol en aliaj lingvoj, la sistemon oni intuicie senvualigas tuj ĉekomence de la lernado, pro ĝia konata struktura

logikeco kaj reguleco. Tio postulas malsamajn didaktikajn teknikojn. Pli ol tio, la distanco inter sistemo, normo (laŭ la Akademio de Esperanto) kaj uzo sin prezentas malpli granda rilate al naciaj lingvoj. Certe, tial la instruisto tuj rimarkas, ke por la lernantaro la vojo liganta la novajn lernitaĵojn al ĝia ĉiutaga uzo montriĝas relative mallonga. La instruado de vortfarada sistemo, ekzemple, ĝuste pro la menciita reguleco, preskaŭ tuj intuicie perceptebla de la studentoj, okazigas sekurecon je la uzo de tiaj ĵusaj lernitaĵoj.

La suba organizo de la libro kaj ties pravigo venas el klarigo fare de la aŭtoro mem. Tial, de tiu punkto de la artikolo, mi uzas gastipajn kaj kursivajn literojn por liaj vortoj.

METODOLOGIO: rekta, konversacia, grupa, ludiga, paroliga, negramatikeca metodo

Tuj eblas konfirmi la aserton de la aŭtoro: bona rezulto dependas de flueco, de ĝustatempa rebato, kvazaŭ en flugpilka ludo. Fakte, ekde la unuaj lecionoj la parolfluecon devas celi la instruisto. Lerni kaj uzi estas la rezulto celata ĝuste de menciitaj trajtoj de rekta metodo, kies emfazo estas paroliga, konversacia, grupa kaj ludiga, tiel ebligante favoran enklasan etoson. La libro-sekcio “gramatikaj gutoj” klarigas esperante kaj malmultvorte la uzindajn kaj uzendajn gramatikaĵojn. Laŭ Malovec (2000: 15), “Necesas konscii, ke ne sufiĉas memori la vortojn kaj gramatikajn regulojn. Oni devas lerni uzi ilin, kapabli pensi en Esperanto sen helpo de la gepatra lingvo, kulturisian lingvosenton”.

Oftas konfuzi pensi, ke lingvo reduktiĝas al ties gramatiko, kaj tio emas naski problemojn pri parolflueco, ĉar konstantaj intervenoj por klarigi (eĉ esperante) gramatikajn detalojn devojigas kaj lernantojn kaj instruistojn de la vera ĉefa celo de instruado, kiu ne estas paroli pri la lingvo, sed



M. Malovec, naskiĝinta en la ĉeĥa urbo Brno en 1953, estas Esperanto-aktivulo, redaktoro, verkisto, tradukisto kaj enkomputiliganto de manuskriptoj postlasistaj de forpasintaj esperantistoj.

(Fonto: *Wikipedia*)

la lingvo mem. Nur post granda sperto pri lingvo-uzado “venas neceso trastudi detalan gramatikon kaj per ekzercado fiksi ĉiujn akiritajn sciojn”. (samloke, sampaĝe).

KLIENTARO: ordinaraj homoj jam alfabetigitaj en siaj naciaj lingvoj, preferinde konantaj la latinidajn literojn kaj la gramatikajn kategoriojn

Diversaj revizioj de ambaŭ libroj fare de la aŭtoro, post la fino de diversaj klasoj, internaciigis la lernolibrojn. Tial, memkompreneble en tiu nuna fazo, eblas instrui eĉ al tiuj kiuj konatiĝos kun la latinida alfabeto dum la kurso. La bezonata kono pri gramatikaj kategorioj tamen temas pri la interna gramatiko ja ekzistanta en ĉiuj ni, eksplicitebla do pogute kaj laŭnecese.

NOMBRO DA LERNANTOJ EN KLASO: minimume 12, maksimume 22

Jen tio devenas el la metodologio mem. Pli aŭ malpli ol tiu nombro malfaciligas la plenan partoprenon de ĉiu lernanto. La tri subaj konsideroj havas similan motivon. Nur menciindas: kunsid-daŭro: 70/80 minutoj, kurso-daŭro: 2 semestroj kaj kunsid-nombro: 2 semajne, minimume (preferinde 3).

CELOJ

Ebligi al la lernanto akiri fundamentan konon pri la lingvo kaj parolfluecon, krom vekti emon al plena posedo de Esperanto. Malnecesas substreki, ke la modeloj de la sekcioj de la lecionoj kongruas kun tiuj celoj kaj fariĝas iloj por ilia atingo.

LERNO-MATERIALO

Teksto-libro akompanata de kompakta disko kaj ekzercaro. La KD enhavas la ĉefajn enkondukajn tekstojn kaj prononc-ekzercojn. Krome, la instruisto havas ekstran KD-on kun presebla help-materialo, surmurigaj bildaroj kaj frazaroj, ekstraj ekzercoj, proponoj pri ekzamenoj ktp.

Pro tio, ke Esperanto estas fonetika lingvo, malgraŭ la avantaĝo konigi la lernantojn pri elparolaj specimenoj de malsamaj parolantoj, frue, laŭ propra observo, la instruisto povos haltigi la disk-uzadon. Vere utila estas la uzo de la helpmaterialo, laŭ indiko konstanta de la instruista gvidlibro. Surmuriga bildaro kaj frazaro ebligas memorigon kaj tujan uzon de oftaj frazoj necesaj por dumklasaj klarigpetoj. Oni rememoru, ke Esperanto estas la instru-lingvo ekde la dua klaso. La uzo de la portugala frue malpermesatas do. La neceso sinkomprenigi esperante motivigas la fruan lernadon de tia frazaro.

MODELO DE LA SEKCIOJ DE LA LECIONOJ:

1. **Esploru la bildojn.** *Silente, por imagi la senvortan historieton.* Krom ekpensigi la studentojn(*) pri aŭdota kaj legota teksto, tiu aktivado ilin preparas por ke ili komparu sian imagitan historieton kun tiu vere prezentita de la leciono. Jen bona motiviga strategio.
2. **Aŭdu silente la konversacion,** *sen la teksto, por kompari kun la lernata imago/kompreno.* Kiel dirite, la aŭdado de la teksto fariĝas pli motiviga pro tiu mensa laboro de la lernanto.
3. **Aŭdu denove,** *legante/sekvante la tekston, por ligi la skribon al la sono.* Pluan fojon la ideo estas aktivigi mense la studenton, kiu tiel ne nur reanalizos sian unuan hipotezon, sed ankaŭ komencos percepti al kiuj skribitaj vortoj respondas tiuj de li ĵus aŭditaj.
4. **Esploru la nepran vortaron kun la instruisto.** Menciindas, ke la nepra vortaro estas esperanta vortlisto klarigota esperante de la instruisto. Tio signifas, ke la lernantaro ekspertas la metalingvan uzon de la lingvo, tre efika maniero alproprigi al si la vortojn kiuj, kiel sciante, estas en alies eldiraĵoj. Rimarkindas en la libroj la uzo de grasliteroj por la afiksoj kaj punkto por kunmetaĵoj.

Nepra vortaro (15-a leciono de la unua libro): *saŭdado* = forta kaj **malĝojiga** **rememoro** pri io bona **perdita** aŭ fora = **resopiro**; **allogi**, fonto, hejmo, lando, infan.aĝo, **malĝojo** = tristo; **montaro**, preĝejo, sonorilo.

5. Praktikado

- a. **Ripetu** *grupe ĉiujn frazojn post la instruisto*. Krom la valoro mem de abunda ripetado kun la celo fiksi la frazaron, la fakto, ke tio okazas grupe, protektas la plej timemajn, kiuj tamen rapide sentas sin sufiĉe sekuraj kaj komencas partopreni la sekvantajn paroligajn sekciojn.
- b. **Ludu konversacion kun la instruisto**. Jen taŭga maniero aŭdigi ilin pri modela prononco antaŭ ol ilia praktiko kun klaskolegoj. Tiaj kunteksto permesas la alĝustigon de la prononco, se oni starigas simpatian enklasan etoson.
- c. **Ludu konversacion kun klaskolego ĉiam aktorece, starante**. Post roli iomete malpli aktorece kun la instruisto, la celo nun estas plivivigi la dialogon, tiel kiel ĝi vere okazas en sociaj interrilatoj. Tiu instruero liberigas la instruiston por observi tiujn, kiuj bezonas pliajn zorgojn kaj tiujn, kiuj plibone ekparolas la lingvon.
- ĉ. **Plilongigu iomete la konversacion laŭ via plaĉo por pli altaj niveloj**. Fakte, depende de la improvizkapablo, la instruisto, aldonante novajn vortojn taŭgajn por la situacio, kutime portas la lernanton al ekklopodado uzi la vortojn aŭdatajn.
6. **Ĉu vi komprenis la tekston?** Malbezonas insisti pri la graveco kompreni tekston kaj respektivan kuntekston. Tiu estas la momento kunigi la scion lingvan kun la scio pri la mondo, tiom gravaj ili estas. La kvar subaj ekzercoj ebligas al la glernantoj pruvi al si mem, ĉu la kompreno kontentigas aŭ ne ilian komunikan bezonon. La ekzerco eĉ montros tiujn pretaj por rakonti la historion per siaj vortoj. Kiam tio okazas finfine la parol-kapablo moviĝas de la teksto direkte al la vivo.

a. **Post aŭdado kaj ripetado de la konversacio diru/skribu false aŭ vere.**

b. **Aŭdu denove kaj kunligu la koncernajn kolumnojn.**

c. **Elektu a aŭ b por respondi.**

ĉ. **Ordigu la eventojn de la teksto.**

7. **Kiel diri.** *Tiu sekcio celas la elstarigadon de la ĉiutagaj ŝablonaj esprimoj, elprenitaj el la teksto, kaj tial ripetigendaj. Tiucele la instruisto insistu ĉe la gelernantoj, ke ili aktorece uzu sian korpon por eldiri tiujn ĉiutagajn frazojn. Bona ekzemplo pri tio estas la uzo de ti-vortoj. Kiel sciante, la senco de tiaj korelativoj, funkciaj kiel montri-vortoj, enestas la tekston. Multfoje tamen la senco estas eksterlingva. Tiel, se lernanto diras, ekzemple, ke «la tablo estas tie, kaj mia libro estas ĉi tie», estas per fingromontri, ke la senco de tiaj esprimoj plene aperas. Tial aktorece oni devas efektiviĝi la sencon de uzataj esprimoj tiaj.*

Kiel diri (6-a leciono):

Permesu min.

Literumi: Ana – A. N. A.

Vi simple nomu min Zeĉjo.


— *Dankon.*

— *Ne dankinde.*

— *Ĉu vi bonvolus... ?*

— *Bonvolu...*

— *Ĝis revido. Fartu bone!*



8. **Ĉu vi kapablas? – defioj.** Sube, graslitere, aperas utilaj kapabloj akireblaj de kompetentaj parolantoj. Krome, oni ne bezonas reliefigi la motivigan rolon de defioj. Instigas la lernantaron la eldiro mem de tiu frazo “**ĉu vi kapablas?**”, ĉar kompreneble ĉiuj volas montri sian kapablon trafe **verki, konversacii kaj solvi enigmojn**. Tiu sekcio favorigas la

uzon de enkunteksta vortprovizo bezonata dum verkado kaj konversacio. La lasta defio ofte vere entuziasmigas ilin, ĉar ĉiuj volas esti la unua solvi la probleman situacion.

9. **Paroligiloj.** Ni analizu kio ili estas kaj surbaze de kiuj principoj kuŝas tiu grava momento de la starigo de parolflueco. Tiel konsilas la aŭtoro: *paroligcele, duonigu la klason kaj lokigu la grupojn plejeble fore unu de la alia. Ili laŭt-voĉe ludu kun la plej fora koleg(in)o. Tiu ĉi estas plur-cele tre efika strategio. La bruado kiu estiĝos ne devas impresi vin. Ĝi estas intenca kaj enhavas alt-valoran pedagogian fundamenton.* Ja konstatablas, ke la etoso enklasa fariĝas tiel amikeca, kaj eĉ gaja, ke ili bezonas kapabli klare sin komprenigi kaj kompreni la alian. Pro tio ili devas koncentriĝi en sia tasko, malgraŭ iu malfacileco. Fakte oni povas kontroli poste, ĝis kiu punkto ĉiuj ili sukcesis, aŭ ne, atingi la interkompreniĝon. Tiu klarigo estas, per si mem, alia bona paroligilo.

LAŬTVOĈE!



Paroligiloj (5-a leciono)

Laboru duope. *Estas diversaj bildoj pri bestoj sur la muro.*

Diru la ecojn de iu besto, por ke la koleg(in)o divenu ĝian nomon. *La instruisto donos al vi muld-bestetojn aŭ bildojn.*

Montru ilin kaj demandu: *"Instruisto, kiu estas la nomo de tiu ĉi besto?" Ripetu la tuta klaso la nomon post la instruisto: "Ĝi estas..." Montru vian besteton kaj ekdiru ĝiajn ecojn. "Ĝi estas..."*

10. **Gramatikaj gutoj.** Sufiĉe klara devas esti la celo de la lecionoj. Nenia dubo povas ekzisti flanke de la instruisto, ĉu la lernantaro ja devas plejeble efike paroli la lingvon aŭ, kvazaŭ fakulo, priskribi gramatikajn punktojn. Jenas ekzemplo de la libro unua pri tio, kio estas tiuj klarigoj.

Gramatika guto (4-a leciono)

Estas du manieroj demandi en Esperanto:

A. **per ĉu** (Respondu: **Jes.** aŭ **Ne.**)

— Ĉu vi komprenis?

— Jes. Mi komprenis.

— Ĉu vi komprenis?

— Ne. Mi ne komprenis.

B. **per Ki...** (Respondu per **informoj**)

— Kiel vi fartas?

— Mi fartas **bone**.

— Kiu vi estas?

— Mi estas **Tiulo**.

— Kie estas Ŝiko?

— Li estas **en la salono**.

— Kia estas Ŝiko?

— Li estas **alta, forta...**

— Kio estas tio?

— Tio estas **libro**.

— Ki...?

— (informo).

- Fonetiko.** *Por la unua nivelo.* La instruisto donu al tiu parto ĝian veran gravecon, atentigante la studenton pri tio, ke Esperanto estas internacia komunikilo, tiel la prononco devas esti zorgeme trejnata, ĉar ĉiu fina litero portas propran gramatikan signifon al la vorto. Nur se oni klare prononcas la finaĵon de la vortoj, la vera senco aperas. Tial zorgema bona prononco okazu ĉiam, ne nur en la unua nivelo.
- Laŭ via opinio** *por sekvontaj niveloj.* Esprimi opinion pri diversaj temoj postulas lingvan kompetentecon akireblan laŭ longe de iu tempo. Tamen, eĉ se per simplaj frazoj, la intruisto devas frue stimuli tiun kapablon.
- Hejma taskaro,** *en la fino de la libro,* ebligas al la gelerntoj la oportunon trejni similajn frazojn ĵus lernitajn. Estas bona momento por plivastigi la vortprovizon.

Resume, kelkaj principoj lingvaj kaj pedagogiaj bezonas havi ĝustan lokon ĉiam, kiam la celo de lernolibro estas helpi la paroligon de la lernantaro. Interalie, finfine, menciindas tiuj principoj: interaga lingva uzo, lernantocentra instruado, komunikbezonaĵaj situacioj,

ĉiutagaj temoj kaj, de tempo al tempo, revizio. Nia persona sperto, instruante kaj la gepatran kaj duan lingvon kiel Esperanto, montras, ke post la fino de tiu ĉi analizata paroliga kurso, plejparto el la gelnantoj sukcesas paroli flue Esperanton.

Paulo Nascentes estas profesoro pri la Portugala, docento pri Esperanto ĉe Universitato de Braziljo — UnB, kunordiganto de Esperanta Nukleo de la samurba neregistara organizo União Planetária (Unio Planeda) kaj eksa vicprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo.



Referenco:

MALOVEC, Miroslav. *Gramatiko de Esperanto*. 2-a pliampleksigita eld. Prago: Kava-Pech, 2000.

(*) NdlR: La prezentata materialo estas uzata de Prof. Paulo Nascentes en universitata medio. Post legado de tiu ĉi artikolo, evidentiĝas tamen, ke la du pritrakitaj libroj estas uzindaj ne nur de studentoj, sed ankaŭ de studantoj.

Cecilia - Ulysses Baldez



Esperanto en Hungario

László István Tóth el urbo Pécs (sud-okcidenta Hungario)

“Nia lando servas kiel la plej autentika eksperimentejo rilate al diversaj metodoj disvastigi Esperanton. Oni povas ekscii pri E-o pasive el telefonlibroj (antaŭe eĉ el horarlibroj pri trajnoj) kaj el diversaj anoncoj, flugfolioj. Sed nur ekscii pri la ekzisto de iu nuntempe uzata, eĉ laŭdata planlingvo, ne povas havi tian fortan efikon, kiel gustumi ĝin, eĉ ellerni ĝin mezgrade.

En nia lando ĉiujare kelkmiroj da gejunuloj ne nur ekscias/informiĝas pri E-o, sed ankaŭ lernas ĝin vole-nevole pro neceso ekhavi pli facile/rapide lingvoatestilon. Do, realiĝas unu el la plej promesplenaj kondiĉoj por la disvastiĝo de E-o: ĝia efektiva, praktika elprovo, provizora uzado eĉ se nur ĝis la sukcesa lingvoekzameno. El tiuj ĉiujaraj kelkmiroj da gejunuloj neniu povas diri, ke ŝi/li ne havis eblon gajni sperton pri la uzeblo, praktikeco, utileco de E-o.

Laŭ la supraj faktoj dedukteblas tio, ke se nek la ellerno kaj elprovo de E-o povas efiki favore al ĝia poruza alproprigo kaj gardado, tiukaze simpla konigo, reklamo (por ne diri propagandon), povas eĉ malpli efiki. Tio estas miskredo, ke nur pli abunda reklamo povas okazigi signifan kreskon de la nombro de tiuj, kiuj ellernas uzcele E-on.

Por pliigi la nombron de daŭraj lingvouzantoj necesas krei kaj popularigi praktikajn eblojn profitigi la lingvon. Pasporta servo kaj multekostaj renkontoj ne sufiĉas. Necesas eluzi ĝuste la plej gravan trajton de iu pontlingvo: faciligi por divers-patrinlingvaj homoj (kiuj inklinas amikiĝi) komunikadi senpene inter si. Interreto povas multe helpi tiucele.

Sekve, tiu problemo ne solveblas enlande, sed nur per kunlaboro tra landlimoj. Necesas kunlabori inter divers-etnolingvaj landoj por realigi reton de individuoj, kiuj pretas interkonatiĝi uzante iun pli

rapide kaj facile ellerneblan lingvon. La celo ne devas esti la movado, sed la privata uzado de la lingvo. Necesas koncentriĝi je privataj homrilatoj, ĉar sur komerca, scienca kaj teknika kampoj jam ne eblas anstataŭigi la anglan lingvon. Post la estiĝo de tia reto, oni ekhavas motivon ellerni E-on. Ekzistas dise en nia mondo centmiloj da solecaj personoj, kiuj ne havas eblon ellerni sufiĉe bone la anglan, kaj kiuj tamen bezonas komuniki, kontaktiĝi kun aliaj personoj. Je tiu bezono, eĉ neceso indas pleje koncentri nian agadon. En privata sfero E-o ankoraŭ ja havas grandegan ŝancon!”

Fonto: Dissendolisto Esperanto en Hungario pere de la brazila diskutlisto Esperanto-br

Fajnoj de la metio

Kelkajn semajnojn, post la fino de baza E-kurso, oni invitis min gvidi lecionon. Komence mi iom timis, sed ne rezistis al la alloga argumento de mia tiama kursgvidanto: “Ne gravas kiom malmulton vi scias, vi ĉiam scias pli multon ol la novaj lernantoj”. Se tiel diri, la afero ŝajnis facile plenumebla: mi bezonus nur sekvi la antaŭe lernitan libron.

La lernantoj aperis kaj, kiel ordinaraj, mi komencis la lecionon per prezento de la alfabeto:

“Esperanto estas tre simpla lingvo. En ĝi estas nur kvin vokaloj”, mi aplombe reklamis.

“Kio estas vokalo?”, sagace pafis min diablino sidanta funde de la lernoĉambro.

Mi estis parkeriginta la tutan alfabeton kaj estis preta ripeti ĝin ĝis laciĝo, se necese. Sed subite jen mi aliigita de reganto al regato per simpla demando... Tiu lernantino unuafoje vidis min kaj jam volis detrui mian instrukarieron!

La diablino ne plu revenis al la lecionoj. Domaĝe, ĉar mi ne povis danki ŝin pro kiom multe mi lernis el tiu unua leciono kiel kursgvidanto.

J.T.Silva, San-Paŭlo

PLIRIĈIGU VIAN VORTPROVIZON

Ampleksigo de vortprovizo estas esenca por regado de lingvo. Taksu vin mem pri kiom da ĉi-subaj vortoj estas familiaraj al vi. Ili estis prenitaj el la verko "Libero kaj amo" de la hungara poeto Sándor Petöfi (1823-1849). La poemojn tradukis la eminenta esperantista poeto kaj tradukisto Kálman Kalocsay. Respondoj troviĝas sur la sekva paĝo.



1. **Ŝtip**/o – A: vasta ebenaĵo senabara en Rusio kaj Siberio; B: lignopeco por bruligo en fajrejo; C: trunketo subportanta la ĉapelon ĉe fungoj; Ĉ: trunketo de greno restanta post falĉado.
2. **Flagr**/e – A: per tremanta brilo; B: standarde; C: arde, pasie; Ĉ: evidente; prenite en la freŝa faro.
3. **Fast**/o – A: stato de ies sano; B: heroo protagonisto en la dramo de Goethe; C: religia festo por celebri abundecon de rikolto; Ĉ: sindeteno de manĝado.
4. **Ŝalm**/o – A: speco de biblia poeziformo; B: mara besto; C: paŝtista muzikilo; Ĉ: virina vesto.
5. **Vekt**/o – A: trabeto adaptebla al homaj ŝultroj por porti po unu sitelon ambaŭflanke; B: segmento de rekto, sur kiu estas difinita irdirekto, signita per sago; C: ĉiu ekstremo de iu objekto; Ĉ: plej supra parto de la homa kapo.
6. **Glim**/i – A: transloki sin supren per la manoj kaj piedoj; B: pasi senbrue, facile, nerimarkite; C: streĉi la muskolojn de la vizaĝo ĝis ridindeco; Ĉ: arĝente brili.
7. **Laŭb**/o – A: insekto parazitanta sur vertebruloj kaj vegetaĵoj; B: favora aprobresprimo de ies opinio pri iu aŭ io; C: larvo de papilio kaj de kelkaj aliaj insektoj; Ĉ: artifarita volbo el foliaro aŭ arbetoj en ĝardeno.
8. **Fulg**/e – A: nigre kiel retaĵo el forbrulintaj gasoj; B: brile; C: rapide kiel fulmo, rapidfluge; Ĉ: maldaŭre.
9. **Hant**/i – A: konscie ekhavi malagrablan senton pri malhonora ago aŭ penso; B: kanti en ĥoro; C: proponi geedziĝon al iu; Ĉ: reaperadi, reviziti.
10. **Ŝim**/a – A: simila al kot-akvo; B: mucida, ranca; C: ŝilde protektita; Ĉ: fermente preparita.

1. **Ŝtupo** – [B] lignopeco por bruligo en fajrejo. “...*pipon fajri mi deziris/ jes, mi fajrus ĝin per ŝtupo/...*” (p. 22) [Opcio A = stepo]; [Opcio C = stipo]; [Opcio Ĉ = stoplo].
2. **Flagre** – [A] per tremanta brilo “*ŝtupoj flagre jam kraketis*” [p. 22] [Opcio B = flage]
3. **Fasto** – [Ĉ] sindeteno de manĝado. “*La tornistron pano mia/ ŝtopis per manĝaĵo ĉia,/ kaj mi perdis ĝin feliĉe,/ nun mi fastos do sufiĉe.*” (p. 24) [Opcio A = farto]
4. **Ŝalmo** – [C] paŝtista muzikilo. “*Ŝalmis, ŝafojn paŝtis li...*” (p. 33) [Opcio A = psalmo]; [Opcio B = salmo].
5. **Vekto** – [A] trabeto adaptebla al homaj ŝultroj por porti po unu sitelon ambaŭflanke. “...*dikan vekton kaptis li rapide/ kaj post Janĉi kuris kun ĝi ven-avide.*” (p. 41) [Opcio B = vektoro]
6. **Glimi** – [Ĉ] arĝente brili. “...*jam la marŝ’ de l’ tempo al noktomez’ proksimis,/ kiam antaŭ Janĉi eta lun’ ekglimis.*” (p. 53) [Opcio A = grimpi]; [Opcio C = grimaci].
7. **Iaŭbo** – [Ĉ] artifarita volbo el foliario aŭ arbetoj en ĝardeno. “*Nokt’ feliĉa! Kun la kara estas mi,/ en la laŭbo nian amon festas ni.*” (p. 89) [Opcio A = laŭso]; [Opcio B = laŭdo]; [Opcio C = raŭpo].
8. **Fulge** – [A] nigre kiel retaĵo el forbrulintaj gasoj. “...*kaj sur si figurojn kuriozajn fulge/ surskrapontajn havas.*” (p. 129)
9. **Hanti** – [Ĉ] reaperadi, reviziti. “...*la spirit’ de Brutus/ animon vian hantas.*” (p. 180) [Opcio A = honti]
10. **Ŝima** – [B] mucida, ranca. “*Agu fine, ho, junuloj/ falu for seruro ŝima.*” (p. 184) [Opcio A = ŝlima]; [Opcio C = ŝirma].

Kontrolu vian taksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli; 3 ĝis 4 trafaj respondoj: **bona**; 5 — 7: **bonega**; 8 — 10: **escepta**, vi povas kandidatiĝi al la Akademio de Esperanto!

Legu en la sekva numero de Brazilei la duan parton de la speciala artikolo pri la valoro de bildliteraturo en lernoĉambro.



Ĝis revido!

Vizitu pli ofte la porinstruistan retejon

www.edukado.net

Viaj gelernantoj tuj perceptos la diferencon!

*Raportu, kaj mi forgesos;
montru, kaj mi memoros;
partoprenigu min, kaj mi lernos.*

Ĉina proverbo



ileiBR

Sukcesan lernojaron en 2008!